

## Naturmedio — strukturado, ekspluato, protekto

Kiu ekkonatiĝis kun la pluvado kaj la senkompromisa domestrino de la junulargastejo lastjare en Treviro, estis tutcerte agrable surprizita de la Naŭburga IS. La "veterdio" favoris

koncerto de Ĵomart kaj Nataŝa venigis larmojn en la okulojn de multaj aŭskultantoj. Ĉefe ili ludis novajn kantojn, sed ankaŭ malnovajn, kiel la tre konata "Amu min". „Junas kaj pli Junas“ dancigis siajn aŭskultantojn. La Novjara Koncerto estis tre disputata. Do, la plej unua koncerto de VVĈP ankaŭ estis la lasta. La plej konata grupo de la mondo, kiu jam vendis miliardojn da lumdiskoj (laŭ propra varbado) donis multegajn aŭ

IS en la germana televido: Ankaŭ tio okazis en Naumburg. Estis longa kontribuo en la vesperaj novaĵoj de MDR, regiona televidstacio. Estis nur iomete mirinde, ke la ĵurnalisto partoprenis en la Tokipona kurso por lerni ion pri Esperanto!

Mia persona fina rimarko? IS plaĉis al mi. La IS-anoj havis grandan elekton inter la diversaj programeroj, kaj tio

## DOLLMÄTSCH – Ein Spiel für Sprachfreaks

Im November fand wie jedes Jahr in München die Spielwies'n statt. Schon recht bald wurde ich auf das Spiel Dollmätsch aufmerksam, weil mir auf der Packung schon das Wort Esperanto grün entgegenleuchtete.

# iso 2003/04

# dollmätsch

21

ĉi-jare la esperantistojn, ĉar preskaŭ ne pluvis dum la tuta aranĝo. Eĉ la respondeculo de la junulargastejo ŝajnis feliĉaj pri la IS-anoj, kaj nun oni jam pripensas, ĉu iam en la proksima aŭ malproksima estonteco okazos IJK en Naumburg.

Tute eksterordinara estis ĉi-jare la prelego pri Tokipono. Tokipono estas alia planlingvo, sed kiel Oleg ĉiam asertis, ne kiel Esperanto por disvastigi amikecon inter la homaro, sed por disvastigi modestecon. La simpla kialo: En Tokipono ekzistas nur tre malmulte da vortoj, do ofte unu tokipona vorto havas diversajn Esperantajn signifojn, ekzemple "lili" povas esti eta, malgranda, malgrava, ktp. Povas esti, se oni mendas vinbersukon en Tokipona restoracio, ke oni finfine ricevas akvon. Do, ne tiel amuze, ĉu ne?! Oleg donis entute ne nur unu aŭ du, sed eĉ kvar sekvajn kursojn de Tokipona. La rezulto estis, ke kelkaj partoprenantoj preskaŭ flue parolis tiun lingvon.


Sed okazis multaj aliaj interesaj aferoj en IS. La vesperprogramo estis, kiel kutime, bonega. Henri de Sabates estis unu el la plej bonaj programerpunktoj. Li imitis tute sola sur la scenejo busvojaĝon. Kaj la

toĝramojn al la fanatikuloj. Ĝi ver ŝajne nun finfine bonŝance realigos la planon iri al Grenlando por ripozi tie. Certe grandega helpo por la LKK kaj ankaŭ por multaj partoprenantoj. La fino de la belega IS-vesperprogramo estis la Internacia Vespero. La IS-poemo esprimis la sentojn de multaj homoj de IS kaj ankaŭ la spontanea Dadaismo-prezentado de Tali Wandel, kion preskaŭ neniu atendis, fascinis multajn. La noktaj filmoj estis por ĉiuj, kiuj ne volis jam enlitiĝi je la unua aŭ dua horo. La konata filmo "Adiaŭ Lenino" subtitolita en Esperanto estas nur unu ekzemplo, kion multaj rigardis.

Sed kompreneble IS estis multe pli ol Tokipona Kurso kaj vesperprogramo. La tuttaga eskurso al "Ferropolis" – la tiel nomata "Fera Urbo" apud Dessau estis bona ekzemplo por la misuzado de la teraj trezorejoj kaj tiel ankaŭ konkuris kun la IS-temo "naturmedio". Estis busvojaĝo al la eksa brunkarba minejo. Hodiaŭ pli ol dek jarojn post la fino de GDR kaj la samtempa fino de la karbominado oni povas nur supozi kiel la loko tiam aspektis. Post la vizito en la fera urbo oni iris al vingustumado en Freyburg apud Naumburg.

signifas, se oni ne volas partopreni en iu prelego, oni ĉiam trovas alternativon. La vesperprogramo kaj ĉefe la prelegoj estis bonaj. Eble mi ankaŭ opinias, ke naturmedio estas interesa temo. Nur domaĝe, ke tio okazis dum la vintra IS kaj ne en IJK en somero, kie oni povus samtempe sperti la naturmedion. Mi pensas, ke iel mankis la kontakto inter la ekstera popolo kaj la esperantistoj. Venis tre malmultaj eksteruloj kaj mi demandas min kial. Ĉu malmulte da varbado? Ne vere povas esti, ĉar Sebastian Kirf varbis en sia Esperantokurso kaj eĉ la televido raportis pozitive pri la Internacia Seminario.

Stephan Mayer  
Stephan-HD@gmx.de



Es handelt sich dabei um ein Spiel für die ganze Familie, während dessen Verlauf man ganz nebenbei spielerisch einige wichtige Begriffe in den Sprachen englisch, esperanto, französisch, italienisch, polnisch, schwedisch, spanisch und türkisch lernt. Das Prinzip ist schnell klar: man sammelt so viele Karten wie möglich mit der gleichen Bedeutung auf unterschiedlichen Sprachen. Gewinner dieses unterhaltsamen Spiels ist der oder diejenige, wer nach einem festgelegtem Zeitraum die meisten Karten gesammelt hat – eigentlich jedoch jeder, da man jedesmal ein paar neue Wörter in fremden Sprachen kennenlernt. Die Regeln können je nach Lust und Laune abgeändert werden. Der Autor Klaus Sommer ist übrigens kein Esperantist, aber sehr interessiert und auf dem besten Wege, noch einer zu werden. Ich halte das Spiel für eine gute Möglichkeit, Esperanto unter Spielefreunden bekannter zu machen. Preis: ca. 18 Euro  
Kontakt: Verlag Sommi, Hausnummer 5, 07985 Gablau, Tel.: 036621/24068, verlag@sommi.biz  
Spielwies'n: 12.-14.11.2004 -  
Homepage: www.spielwiesn.de  
Karulin' Verena Hötzl  
carolin\_hoetzl@web.de